



S-ro ROMANO AYZA  
Staba leut-kolonelo kaj Doktoro je Sciencoj. Valencia.

# LA SUNO

## HISPANA \*

---

**ENHAVO:** 1. Protestoj.—2. Pruntita pago.—3. Dua Kongreso.—4. Sciigoj.—5. Bibliografio.—6., Nia societo.—7. Korespondada fako.—8. Niaj vizitantoj.—9. Anoncoj.

---

## Protestoj

La Redakcio de LA SUNO HISPANA protestas energie je la nehumana atenco okazinta en Madrido la 31<sup>an</sup> de la pasinta Majo.

Ni sendas la esprimon de nia tutanima kondolenco al la familioj de la okaze oferitoj kaj ankaŭ ĝojas pro la mirakla savo de Geregnestroj.

Ni estas ĝentilece devigataj enpresi ĉi sube la protestojn ricevitajn el fremlandoj, kaŭze de la sama teruriga atenco, kaj kiujn ni dankas je la nomo de la interesitoj.

Groupe Esperantiste de Paris.—Le President.—Paris la 1<sup>a</sup> Junio 1906.

Je la nomo de ĉiuj Parizaj Esperantistoj, karaj samideanoj, mi sendas al la Hispanaj amikoj la esprimon de nia granda simpatio, niajn korajn kondolencojn pro la kruela okazintaĵo, kiu tiel dolore funebrigis la edziĝfeston; niajn gratulojn, ĉar via Reĝo feliĉe saviĝis el tiu terura atako; niajn bondezirojn por la daŭra feliĉo de la eminentaj novaj Geedzoj. Al ĉiuj hispanaj esperantistoj kunfratan internacian saluton.—*C. Bourlet.*

Tours la 1<sup>an</sup> de Junio 1906.

Altestimata S-ro Direktoro: Je la nomo de l' Franca Katolika Junularo Esperantista mi protestas kontraŭ l'atenco nehomaneca kiu okazis en Madrid kaj funebrigis tiom da familioj. Mi petegas ke Dio, iliajn Gereĝajn Moŝtojn ĉiam protektu, kaj al la malfeliĉuloj li donu pacon kaj senfinan ripozon. Tute via, *V. R. Aubin.*

# PRUNTITA PAĜO

## Esperantista Centra Oficejo

*Raporto pri la vesperfesto de la 28<sup>a</sup> de Aprilo 1906*

La Esperantista Centra Oficejo organizis, la 28<sup>an</sup> de Aprilo 1906, por la esperantistoj de Parizo kaj la ĉirkaŭaĵo, kaj por iliaj amikoj, koncerton, kies programo estis aranĝita tiamaniere, ke ĝi interesis ankaŭ la personojn, kiuj ne komprenas Esperanton. La kunveno okazis en la festĉambro de la «Société française de Photographie», 51, rue de Clichy, kiu estis tro malgranda por enhavi ĉiujn personojn, kiuj petas kartojn. Tio igis la Centran Oficejon komenci la organizadon de dua kunveno, kies programo estas preskaŭ sama, kaj kiu estos okazinta la 23<sup>an</sup> de Majo.

S-ro Mehrmann komencis la koncerton ludante sur fortepiano du belajn ariojn: la «Sonate en mi mineur» de Grieg kaj la «Air de Sallet» de Chaminade. La aŭdantaro tre aplaudis la spertan pianiston.

La programo anoncis paroladeton de S-ro Carlo Bourlet, kiu bedaŭrinde ne povis fari ĝin, ĉar li estis malsaneta.

S-ro René Vast ĉarmis ĉiujn, kantante «Flugintaj revoj» je Grabowski, kun rimarkinda muziko de S-ro Paul Wachs; kaj «Ho mia kor» de Zamenhof, kun muziko de S-ro Guivy, jam aplaudita en Bulonjo.

«L' elixir du Révérend Pere Gaucher» estas rakonto de Alphonse Daudet, kiun diris tre lerte en franca lingvo S-ro Fournez.

La «Reverie» de S-ro de Ménil estie tre agrabla ario, ludita tre sperte de S-ino de Ménil kaj de S-ro H. Wagner.

S-roj Lagonneau kaj Thomas kantis france amuzan duopan kanteton, kaj la aŭdantaro multe ridegis.

S-ro de Coppet diris tre belan poezion de S-ro Sentis: «En monto». Li tiel bone elparolis, ke eĉ la personoj kiuj ne konas Esperanton komprenis la sencon de la poezio.

«La Espero» de nia majstro (muziko de S-ro de Ménil) estis kantata de nia agema samideano Georges Grosset.

La unua parto de la programo finiĝis per «Le fluide de John», tre amuza komedio tradukita de S-ro Huet, kun afabla permeso de la aŭtoro S-ro M. Hennequin. Ĝi estis tiom pli interesa, ke tri diversnac'aj personoj ludis ĝin.

En la dua parto, S-ro Th. Cart faris tre interesan paroladon pri la propagando de Esperanto inter la blinduloj. Li faris resuman historion de la progresoj de nia lingvo ĉe tiuj malfeliĉuloj kaj de la multaj klopodoj, kiuj kaŭzis tiujn progresojn.

Nia kunbatalanto Blangarin rakontis «La Muŝoj» amuza monologo, kiun ĉiu komprenis senpene.

S-ro H. Wagner, talenta violonisto ludis la «Contes Mystiques» de Paganini, kaj tiu ludo, majstre farita, havis grandegan sukceson.

«La Espero» (muziko de S-ro Coppet) estis kantata de la aŭtoro, kies voĉo estis admirata de ĉiuj.

Fine la komedio-revuo: «L' héritage Klodarec» ludita france pruvis al ĉiuj la utilecon de Esperanto. Verkis ĝin S-ro F. de Ménil, la konata redaktoro de la Tutmonda Jarlibro.

La sprita aŭtoro kaj la lertegaj ludintoj de tiu komedio ricevis la plej grandan sukceson kaj estis tre longe aplaudataj de la entuziasma aŭdantaro.

Organizante tiun feston, la Esperantista Centra Oficejo intencis iniciatigi novajn

kunvenojn de la parizaj esperantistoj, kaj montri la ĉambrojn kiujn oni povos uzi por tiuj kunvenoj. La Centra Oficejo proponas ankaŭ siajn ĉambrojn por ĉiuj apartaj esperantistaj sekcioj fondeblaj: komercistoj, turistoj, k. t. p.

**SVISA ESPERANTA SOCIETO.** La 16<sup>an</sup> de Aprilo (Paska lundo) okazis sub la prezido de pastro Schneeberger-Laufen, eksterordinara ĝenerala kunveno de l' Svisa Esperanta Societo en la hotelo «Aarhof» en Olten. Ceestis 35 delegitoj kaj gastoj el la urbaj grupoj de Bern, Zürich, Basel, Winterthur, Geneve, Neuchatel, kaj aliaj urboj: eksterlandaj amikoj S-roj G. Chavet, sekretario de la Centra Oficejo en Parizo kaj Paul Berthelot, redaktoro de «Esperanto» en Geneve. Oni parolis en Esperanto: la permesitajn naciajn lingvojn oni nur malofte uzis.

Unuanime la kunvenitoj decidis dividi la diversajn taskojn propagandajn inter la grupoj. Tiel nun okupiĝas:

Pri propagando ĉe la estraro kaj oficistaro svisa la grupo de Bern;  
 ĉe la profesoraro, studentaro kaj presaro la grupo de Zürich;  
 ĉe la komercistaro, hotelistaro, k. t. p. la grupo de Basel;  
 ĉe la fervojaj kaj poŝtaj oficistoj la grupo de Solothurn;  
 ĉe la laboristoj kaj iliaj organizoj la grupoj de Winterthur;  
 ĉe la instruistaro kaj infanaro la grupo de Locle & Brenete;

pri propagandiloj kaj ilia disdono al la grupoj svisaj la grupo de Neuchatel.

Oficiala organo por la societo kaj ĝiaj grupoj estas la «Svisa Espero» kiu estas helpata de korespondantoj el ĉiu grupo; redaktoro centra estas S-ro D-ro Renard-Geneve kiu kolektas kaj finredaktas ĉiujn sciigojn ricevitajn el la tutsvisa samideanaro.

Donacon ricevis la Svisa Esperanta Societo de la konata maljuna esperantisto S-ro L. E. Meier en München, kiu treege ĝojigis la svisan samideanaron per la alsendo plena traduko de la Schiller'a dramo «Wilhelm Tell», verkita en la versmetro de germana originalo. Post tre lerta kaj interesa favora kritiko de S-ro instruisto Lehner-Basel kaj praktika financprojekto de S-ro F. Wenk-Bassel la kunveno decidis unuanime, ke la «Svisa Esperanta Societo» presigu la tutan verkon, por prezenti per ĝi honoran dediĉaĵon al la fremdlandaj esperantistoj venontaj al la Geneva Kongreso. Kotizoj repageblaj jam estas subskribitaj en preskaŭ sufiĉe granda nombro kaj ĉiu alia kotizo (po 25 frankoj) estas danke akceptata de la prezidanto de la Basel'a grupo (S-ro F. Wenk, 7, St. Albananlage, Basel). Tre aplaŭde oni aŭdis diversajn deklamaĵojn el «Wilhelm Tell»; ili pruvis ke la germana originalo estas imitata en la Esperanta traduko en mirinda maniero. La verko certege konvinkigos la germanlingvanojn, ke Esperanto estas flekseblega kaj bonsonega lingvo kaj ke estas eble, redoni ĉiujn impresojn de originala verko. La tasko presigi la verkon estas transdonita je la nomo de la societo svisa al la grupo Basel.

La venonta ordinara kunveno okazos en Genevo je la komenco de la Kongreso.  
 —F. S.

La 8<sup>an</sup> de Majo fondiĝis en Frankfurt a. M.: «Progreso» Internacia Komercista Esperanta Societo.

Per fondo de filioj en ĉiuj urboj de la tuta mondo, la nova societo celadas, propagandi Esperanton speciale en la komercistaro. La estraro konsistas el Carl Feyerabend (prezidanto), Stefan Wolf (kasisto); plue estis elektitaj en la estraron: Carl Barthel, Max Eisenkramer, H. Docters, Heirich Haas, Adolf Hirsch, Ludwig Katz, Carl Kirchhoff, Carl Küchler, Max Ruhstadt. Kotizaĵo por firmoj almenaŭ markoj 10, por komercaj oficistoj markoj 1 jare. Filio povas esti fondata, se almenaŭ 20 membroj de la societo loĝas en unu urbo. La filioj estas rajtigitaj, reteni 50 % de la kotizaĵoj. La resto estas sendota al la centrejo Frankfurt a. M., por kovri la kostojn

de la societa gazeto «Internacia Komercia Revuo» kaj por la ĝenerala propagando de la tuta societo.

Konsiderante la gravecon de tiu ĉi entrepreno, ĉiuj komercistoj de la tuta mondo estas petataj, *tuj aliĝi* al la societo. Detala Regularo senpage. Adreso: «Progreso» Internacia Komercista Esperanta Societo, Frankfurt a. M., Neue Mainzerstrasse 59, monsendaĵoj al la kasisto, S-ro Stefan Wolf, Frankfurt a. M., i. H. Darmstadter Bank.

*Komercistoj de la tuta mondo, organizu vin, por enkonduki Esperanton kiel komerca lingvo!!!*

Kun alta estimo «Progreso» Internacia Komercista Esperanta Societo: *Carl Feyerabend*, prez.; *Carl Barthel*, sekr.

La subskribinta grupo proponas al la samideanoj simplan kaj malgrandan insignon, kies enkonduko estus tre malmultekosta kaj ankaŭ sukcesplena.

La insigno estas pinglo kun verda emajla kapeto. Ĝi estos fiksata en la angulo de la dekstra vestkolumo, bone videbla kaj tamen ne trudema. Pro tiu-ĉi afero ni nin turnis al la Centra Oficejo kaj al D-ro Zamenhof. Ni ricevis la jenajn respondojn.

«Via ideo, proponi al la esperantistaro novan kaj malgrandan insignon, konsistantan el simpla pinglo kun verda kapeto, estas tre interesa, sed bedaŭrinde la Centra Oficejo havas nenian rajton kaj aŭtoritaton por mem proponi tiun ideon al niaj samideanoj; ĝi nur povas doni al vi la konsilon, ke vi komuniku vian proponon al la esperantistoj per la helpo de la gazetoj.»—Centra Oficejo.


«Ĉia signo, kiu donas al la esperantistoj la eblon ekkoni unu alian en vojaĝo aŭ en publikaj lokoj, estas laŭ mia opinio tre dezirinda. Se la frankfurta grupo ĝin akceptis, mi estas certa, ke baldaŭ ankaŭ la aliaj grupoj kaj apartaj esperantistoj imitos tiun ĉi ekzemplon.»—D-ro Zamenhof.

Estas fakto, ke la samideanoj pro diversaj kaŭzoj ne ĉiam kaj ĉie surmetas la verdan stelon; kiel ofte estas esperantistoj najbaroj en vojaĝo, kafejo, restauracio k. t. p., ne ekkonante sin reciproke! Ili ne povas paroladi kune esperante kaj fari la plej bonan propagandon por nia bona afero. Ni ne kontraŭbatalas la verdan stelon; kontraŭe. Ni nur proponas duan signon plej simplan. La verda pinglo modesta kaj tiel malmultekosta, ke ĉiu esperantisto senescepte povas aĉeti tian, povas paradi sur ĉiu vesto.

La prezo estas po 50 pingloj 20 pfenigoj, po 100 pingloj 35 pf.

La sendkosto estas internacie 10 pfenigoj.

Ni petas direkti la mendojn al Esperantista Grupo Frankfurto A M, je manoj de S-ro C. Barthel, Woehlerstr. 14.—*Esperantista Grupo Frankfurt (M)*.



## DUA KONGRESO UNIVERSALA EN ĜENEVO

(de la 28<sup>a</sup> de Aŭgusto ĝis la 6<sup>a</sup> de Septembro 1906) sub la prezido de D<sup>ro</sup> Zamenhof)

Dua cirkulero de la Loka Organiza Komitato

**Programo:** 28, 29, 31 Aŭgusto, 1 Septembro, en Genevo: ceremonioj kaj kunvenoj de la Kongreso: 30 Aŭgusto: ŝipveturado sur la Lemana lago kaj tagmanĝo en Vevey; 3, 4, 5, Septembro: vojaĝo tra Svisujo.

**Aliĝoj:** *Oficiala kongreskart*o (verda karto: 10 fr.) Ĉiu, kiu aĉetos tiun karton, havos rajton ĉeesti je ĉiuj ajn kunvenoj de la kongreso, ricevi ĉiujn dokumentojn necesajn por la laborkunvenoj, kaj ankaŭ aĉeti 1, 2, 3 aŭ 4 *Familianajn Kartojn* (blanka karto: 5 fr.) por anoj de sia familio.

**Alvoko:** La Komitato petas, ke oni bonvolu mendi, kunsendante la monon, la

kartojn kiel eble plej baldaŭ, por ke oni povu kalkuli la nombron de la kongresanoj.

**Loĝado:** La Kongresanoj, kiuj volas esti certaj pri konvena loĝado devas de nun *Lui Cambron*. La Komitato zorgos pri tio kaj havigos loĝejon al la kongresanoj kiuj sciigos la datojn de sia alveno kaj foriro, kaj sendos al ni almenaŭ tri frankojn por ĉiu nokto. Specialajn dezirojn oni penas plenumi. Tiuj kiuj pagos 4 fr. havos kompreneble proporcian ĉambron. Tiuj, kiuj pagos 5, 6 fr. aŭ pli havos proporcian ĉambron en hotelo. La Grupo aŭ Lernantaroj kiuj dezirus loĝi en komunaj dormejoj (kompreneble je tre malkara prezo) devas sendi oficialan demandan leteron kun precisaj detaloj al la Loka Komitato, kiu donos al ili ĉiujn necesajn sciigojn.

**Manĝado:** Por certigi la Kongresanojn pri preciza kosto de manĝoj, la Komitato publikigos nomaron de ĝenevaj restoracioj kiuj promesis doni tagmanĝon (kun trinkaĵo) po 2 frankoj. —Krom tio, la Komitato sciigas ke en Ĝenevo ekzistas grandaj Popolaj Restoracioj, kie oni povas havi simplan, sed bonan manĝon por fr. 0,60.

**Teatra vespero,** (29 Aŭgusto). Ĉiuj grupoj aŭ izolaj esperantistoj kiuj intencus ion kanti, deklami aŭ ludi bonvolu de nun sin enskribigi kaj sendi al ni la tekston de la verkoj, kiujn ili intencus prezenti.

**Balo** (31 Aŭgusto). La Komitato petas ke multaj Kongresanoj alportu *naciajn kostumojn* por tiu balo.

**Kongresaj Markoj.** Oni de nun povas aĉeti, por glui sur leteroj aŭ poŝtkartoj, la oficialan markon de la Kongreso kun arta ilustraĵo. Prezo: 100 markoj, fr. 1,50; 500 markoj fr. 5.

\*\*\*

Aliĝojn, monon, korespondaĵojn, k. t. p. unuvorte ĉion, kio koncernas la Kongreson, oni sendu nur al:

*Kongresa Oficejo, 15, quai de l'Île Genève (Suisse).*

En Ĝenevo, la 16<sup>an</sup> de Majo 1906. —Je la nomo de la Loka Organiza Komitato, la ĝenerala Sekretario, *Edmond Privat*. —La Sekretario komisiita al la Gazetaro, *H. Hower*.

## Sciigoj

*Pro manko da loko ni estas devigataj mallonge raportiti la plej gravajn sciigojn ĉu naciajn ĉu fremdajn.*

**Francujo.**—Laŭ mi legas en «Petit Parisien», la franca ĵurnalo fervora propagandanto de Esperanto, jam estas oficiale decidita la instruado de nia helpa lingvo en la superaj unuagradaĵoj lernejoj de la urbo Parizo.

**Belgujo.**—En la Maja numero de «La Belga Sonorilo», S-ro Coox proponas starigi internacian helpkason en kiun oni kolektus monon de ĉiulandaj donacemuloj kaj malavaruloj por helpi al la suferantoj de publikaj malfeliĉegoj aŭ katastrofoj.

*Por falta de espacio nos vemos obligados á anotar brevemente las más importantes noticias nacionales ó extranjeras.*

**Francia.**—Según leemos en «Petit Parisien», el periódico francés, fervoroso propagador del Esperanto, ya está oficialmente aprobada la enseñanza de nuestra lengua auxiliar en las escuelas superiores de primer grado en la ciudad de París.

**Bélgica.**—En el número de Mayo de «La Belga Sonorilo», el Sr. J. Coox propone establecer una caja de socorro internacional, en la que se recaudaría dinero de las personas caritativas y desprendidas de todos los países para socorrer á las víctimas de públicas desgracias y catástrofes.

La afero, unuavide, ne ŝajnas tre facila; tamen SUNO HISPANA ĉiam estas preta subteni laŭpove ĉiun bonfaran entreprenon, kaj sendas al S-ro COOX sian plenan aprobon por la ideo.

En la sama belga kunfrato ni legas: «La ĵurnalo «Le XX<sup>e</sup> Siècle» daŭrigas publikigi esperantajn artikolojn ĉiudimanĉe; per sia numero de la 22<sup>a</sup> de Aprilo, ĝi sciigas nin ke, en Bohemujo, policistoj jian tagon arĉestis tridek laboristojn, tiel ke tiuj ĉi korespondis Esperante kun rusoj kaj ĉar oni estis trovita ĉe ili esperantajn gazetojn, leterojn, poŝtkartojn. Oni kredis ke Esperanto estas lingvo anarĥia! La eraro malkovriĝis, sed nur post ok semajnoj.»

**Italujo.**—S-ro Luigi Giambene, kiel sekretario de «Imperiosa Civitas»—Roma Esperantista Societo—sciigas al ni ke la sidejo de tiu Societo, 82 via Monteroni, estas malfermata ĉiumarde de la 7<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>e</sup> horo vespere. Ĉiuj esperantistoj, precipe la fremduloj, kiuj vizitas Romon, estos tutkore akceptataj.

La monata revuo «Malta Letteraria» publikigas bonegan artikolon pri lingvo internacia kaj raportas la sukcesojn atingitajn de Esperanto.

**Germanujo.**—La 20<sup>an</sup> de Majo fondiĝis en Brunsvigo la Germanlingva Esperantista Societo enhavonta ĉiujn, kies gepatra lingvo estas la germana. Ekster la multenombraj anoj de la Brunsviga Grupo, kiu aranĝis la Kongreson tiel sukcesplene kiel ofereme, ĉeestis reprezentantoj de la Grupoj de Berlino, Breslau, Brunn, Elbing, Frankfurt, s. M., Frankfurfa Laborista Grupo, Goppingen, Halle, Hamburgo, Hanau, Neu-Isenburg, Prag, Schoneberg, Stuttgart, Ulm, Ung, Ibradisch, Wien, Wiesbaden kaj fondis unuigton nomatan «Germanlingva Esperantista Societo».

La ĉefa tasko de tiu societo estas la disvastigado de Esperanto tra la scienco kaj komerco, precipe en la germanlin-

El asunto, á primera vista, no parece muy fácil; sin embargo, SUNO HISPANA siempre está dispuesta á sostener, según sus fuerzas, toda empresa bienhechora, y envía al Sr. COOX su aprobación plena para la idea.

En el mismo colega belga leemos:

«El periódico «Le XX<sup>e</sup> Siècle» continúa publicando todos los domingos artículos en Esperanto; en su número del 22 de Abril nos comunica que en Bohemia la policía arrestó en un día á treinta obreros por sostener correspondencia en Esperanto con los rusos y porque se les encontró periódicos, cartas y postales esperantistas. ¡Se creyó que el Esperanto es una lengua anarquista! El error se descubrió, pero al cabo de ocho semanas.»

**Italia.**—Sr. Luigi Giambene, como secretario de «Imperiosa Civitas»—Sociedad Esperantista de Roma,—nos anuncia que la residencia de dicha Sociedad, 82, via Monteroni, está abierta *todos los martes* desde las siete hasta las diez de la noche. Todos los esperantistas, particularmente los extranjeros que visitan á Roma, serán cordialmente recibidos.

La revista mensual «Malta Letteraria» publica un excelente artículo sobre la lengua internacional y refiere los éxitos alcanzados por el Esperanto.

**Alemania.**—El 20 de Mayo se fundó en Braunschweig la Sociedad Esperantista, formada por todos aquellos cuya lengua patria es el alemán. Aparte los numerosos socios del Grupo de Braunschweig, que organizó el Congreso con tanto trabajo como éxito, asistieron representantes de los grupos de Berlín, Breslau, Brunn, Elbing, Frankfurt S. U., el Grupo de Obreros de Frankfurt, Goppingen, Halle, Hamburgo, Hanau, Neu-Isenburg, Prag, Schoneberg, Stuttgart, Ulm, Ung, Ibradisch, Wien, Wiesbaden, y fundaron la unión llamada «Germanlingva Esperantista Societo».

La principal tarea de esta Sociedad es la divulgación del Esperanto en las ciencias y comercio, principalmente en los

gvaj landoj, Germanujo, Austrujo kaj ankaŭ Svisujo.

La jarkotizaĵo estis fiksata je 3 marto, entenate la senkosta livero de la oficiala organo «Germana Esperantisto».

Kiel estraro estis elektitaj:

Honora prezidanto: D-ro L. Zamenhof; 1<sup>a</sup> prezidanto, D-ro E. Mybs; 2<sup>a</sup> prezidanto kaj sekretario, D-ro J. Hanauer; kaŝisto, Fr. Schuck.

Sabate vespere estis komuna vespermanĝo en la kunvenejo de la Brunsviga Grupo, post kiu longa serio de paroladoj kaj kantoj kunigis multenombrajn gastojn ĝis matena horo je kora amikeco kaj paco. Multaj estis la alvenintaj telegramoj kaj leteroj salutaj, kaj multegaj la specialaj kongresaj poŝtkartoj ĉien forsenditaj. Laŭ propono de kongresa sindiko, D-ro Bracke, oni sendis respektan leteron al D-ro Zamenhof.

La adreso de la Societo, kies fondiĝon ni ĝoje sciigas, estas: 68, Marktstrasse. *Altona*.

**Hispanujo.** — Jam estis en presado nia lasta numero, kiam ni ricevis malĝojigan sciigon. S-ro Vidal Llopart, nia kara amiko, nia fervora kunlaboranto, mortis! Nenece estas, ke ni publike diru kiom ni bedaŭras tiel valoran perdon, kaj nur ni petas de lia distinginda familio, ke ĝi bonvolu akcepti la esprimon de nia plej sincera kondolenco.

Ni petas, ke la gazetoj, kiujn estis aboninta S-ro Vidal Llopart, haltigu la sendadon de la numeroj je la nomo de tiu sinjoro.

La esperantista grupo de *La Guardia* (Jaén), kies fondiĝon ni jam konigis al nia legantaro, elektis la jenan direktantan komitaton:

Prezidanto, S-ro Enrique Gómez Beltrán; vic-prezidanto, S-ro Laureano Muñoz Escobar; sekretario, S-ro Serafin Baudín Agüero; voĉdonantoj, Pastro Francisco de P. Aranda, S-ino Virginia Oloriz,

países donde se habla alemán, Alemania, Austria y también Suiza.

La cuota anual ha sido fijada en 3 marcos, incluyendo el envío gratuito del órgano oficial «Germana Esperantisto».

Como junta fueron elegidos:

Presidente honorario, Dr. L. Zamenhof; presidente primero, Dr. E. Mybs; presidente segundo y secretario, doctor J. Hanauer; cajero, Fr. Schuck.

El sábado por la noche cenaron los congresistas en la residencia del Grupo de Braunschweig, después de lo cual una serie de discursos y cantos reunió a numerosos invitados hasta la madrugada en cordial amistad y fraternidad. Muchos fueron los telegramas recibidos y las cartas de salutación, y muchísimas las postales especiales del Congreso remitidas a todas partes. A propuesta del síndico del Congreso, Dr. Bracke, se envió respetuosa carta al Dr. Zamenhof.

La dirección de la Sociedad, cuya fundación anunciamos con regocijo, es: 68, Marktstrasse, *Altona*.

**España.** — En prensa ya nuestro último número, recibimos una tristísima noticia. ¡El Sr. Vidal Llopart, nuestro querido amigo, nuestro fervoroso colaborador, ha muerto! Innecesario es que expresemos públicamente el sentimiento que pérdida tan valiosa nos proporciona, y sólo pedimos a su distinguida familia que acepte la expresión de nuestro más sincero pésame.

Suplicamos que las revistas a que estuviera suscrito D. J. Vidal Llopart suspendan el envío de sus números a nombre de dicho señor.

El Grupo Esperantista de «La Guardia» (Jaén), cuya fundación anunciamos ya a nuestros lectores, ha elegido la siguiente junta directiva:

Presidente, D. Enrique Gómez Beltrán; vicepresidente, D. Laureano Muñoz Escobar; secretario, D. Serafin Baudín Agüero; vocales: P. Francisco de P. Aranda, D.<sup>a</sup> Virginia Olóriz, Sres. D. Felip

S-roj Felipe Montes, Ildefonso Rubio, Sixto Rodríguez, Juan Carmona, Manuel Garrido, Ramón Olóriz, Narciso Soto, Blas Torres y Ricardo Fernández.

La Direktanta Komitato de la Grupo Esperantista de Foz (Lugo) ĵus fondita, estas la jena:

Prezidanto, S-ro Camilo de Cela; voĉdonantoj, S-roj Antonio Noriega y Constantino Vázquez; sekretario, S-ro Antonio Villar.

Vere citindaj esta la jenaj artikoloj, kiuj por divastigo de Esperanto aperis en niaj naciaj ĵurnaloj.

«Por el mundo esperantista», de sinjoro Francisco Añino en «El Faro» de Vigo.

«El Esperanto», de S-ro Francisco Morote, en «Papel y Tinta» de Toledo.

«El Esperanto para el estudio de idiomas», de S-ro Codorniu en «El Liberal» de Murcia kaj «Notas esperantistas» de la sama aŭtoro en «La Verdad».

Anonima artikolo «El Esperanto», en «El Nervión» de Bilbao.

«El Esperanto en nuestra provincia», de «Un esperantista jienense» en «La Libertad» de Jaén.

«Por una gran idea», rimarkinda artikolo de S-ro S. Baudín, en «La Lealtad» de Jaén.

S-ro Monteagudo, en la «Revista Gallega» priskribas la progresojn de Esperanto en fremdaj landoj.

S-ro Víctor O. Allende publikigis rimarkindajn artikolojn en «El Noticiero Bilbaino».

S-ro Román Ayza daŭrigis la serion de propagandaj artikoloj en «La Correspondencia de Valencia».

«La Unión Mercantil» de Málaga publikigis hispanen tradukitan, sub la titolo «Tendencoj de Esperanto» la raporton, kiu pri la verko «Tutmonda poŝlibro internacia por komercistoj, turistoj, k. t. p.» de S-ro Georgo Norman aperis en nia kolego «Germana Esperantisto».

En Calonge (Gerona provinco) sinjoro

Montes, D. Ildefonso Rubio, D. Sixto Rodríguez, D. Juan Carmona, D. Manuel Garrido, D. Ramón Olóriz, D. Narciso Soto, D. Blas Torres y D. Ricardo Fernández.

La junta directiva del Grupo Esperantista de Foz (Lugo), que acaba de fundarse, es la siguiente:

Presidente, D. Camilo de Cela; vocales: D. Antonio Noriega y D. Constantino Vázquez; secretario, D. Antonio Villar.

Dignos de cita son los siguientes artículos que para divulgación del Esperanto han aparecido en varios periódicos nacionales:

«Por el mundo esperantista», de don Francisco Añino, en «El Faro de Vigo».

«El Esperanto», de D. Francisco Morote, en «Papel y Tinta», de Toledo.

«El Esperanto para el estudio de idiomas», de D. Ricardo Codorniu, en «El Liberal», de Murcia, y «Notas esperantistas», del mismo autor, en «La Verdad».

Artículo anónimo «El Esperanto», en «El Nervión», de Bilbao.

«El Esperanto en nuestra provincia» de «Un esperantista jienense» en «La Libertad», de Jaén.

«Por una gran idea», notable artículo de D. S. Baudín, en «La Lealtad», de Jaén.

El Sr. Monteagudo, en la «Revista Gallega», describe los progresos del Esperanto en el extranjero.

D. Víctor O. Allende ha publicado notables artículos en «El Noticiero Bilbaino».

D. Román Ayza continúa la serie de artículos de propaganda en «La Correspondencia de Valencia».

«La Unión Mercantil», de Málaga, publicó, traducida al castellano, bajo el título «Tendencias del Esperanto», el juicio crítico que sobre la obra «Tutmonda poŝlibro internacia por komercistoj, turistoj, k. t. p.», de D. Jorge Norman, apareció en nuestro colega «Germana esperantisto».

En Calonge (provincia de Gerona)



Antonio Dedrid malfermis kurson de Esperanto tre sukcese ĉar ĝin ĉeestas multaj lernantoj.

Fine, dank'al l'energiaj klopodoj de S-ro Elizondo kaj de kelkaj aliaj fervoraj semideanoj helpintaj lin efike, oni sukcesis fondi definitive en grava ĉefurbo Bilbao Grupon Esperantistan, kies nombro da membroj pligrandiganta senĉese permesas autaŭdifini prosperan sorton por nia lingvo en tiu ĉefurbo.

Jen ĝia komitato: prezidanto: T. Elizondo; vicprezidanto, V. O. Allende; sekretario, R. Unzaga; kasisto, M. Zabala; voĉdonantoj, J. Santamaría, I. Lorante kaj J. Aguirreche.

Plena adreso de la Grupo: Grupo Esperantista, strato García Salazar, Bilbao (Hispanujo).

Nia senlaca propagandisto S-ro Sabadell, sciigas nin ke li fine sukcesis fondi Grupon en Barcelono en la sidejo de «Ateneo Enciklopedia Populara». Ni akceptante la korajn kaj kunfatajn salutojn de la anoj kaj sur tuto de S-ro Sabadell tutkore dankas ilin pri ilia laborado. Jen la Direkta Komitato: Honora prezidanto, D-ro Zamenhof; efektiva, S-ro Sabadell; vicprezidanto, A. Muntané; sekretario, A. Pierre; kasisto, R. Camprubi, bibliotekisto, Manuel de la Fuente; voĉdonantoj, J. Chaves kaj L. Rafols Kursoj estas farataj en: 1<sup>o</sup> Grupo Esperantista de la A. E. P., profesoro R. Camprubi.—2<sup>o</sup> Centro de Unión Republicana, profesoro Aŭgusto Pierre.—3<sup>o</sup> «Asociació Catalunya», profesoro Domingo Bonet.—4<sup>o</sup> «Centre Instructiu», profesoro Miguel Cases.—5<sup>o</sup> «Cataluno Espero», profesoro Juan Rosals.

D. Antonio Dedrid ha abierto un curso de Esperanto con mucho éxito, pues á él asisten muchos discípulos.

Por fin, gracias á los enérgicos trabajos del Sr. Elizondo y de algunos otros fervorosos *samideanos* que le han ayudado eficazmente, se ha conseguido fundar definitivamente en la importante capital de Bilbao un Grupo Esperantista, cuyo número de miembros sin cesar creciente permite augurar una suerte próspera á nuestra lengua en esta capital.

He aquí su comité: Presidente, T. Elizondo; vicepresidente, V. O. Allende; secretario, R. Unzaga; cajero, M. Zabala; vocales: J. Santamaría, I. Lorante y J. Aguirreche.

Dirección: Grupo Esperantista, calle de García Salazar, Bilbao (España).

Nuestro incansable propagandista señor Sabadell, nos comunica que por fin ha conseguido fundar un grupo en Barcelona en el domicilio del «Ateneo Enciclopédico Popular». Nosotros, al aceptar los cordiales y fraternales saludos de sus miembros, y sobre todo del Sr. Sabadell, de todo corazón les damos las gracias por sus gestiones. Hé aquí la Junta Directiva: Presidente honorario, Dr. Zamenhof; efectivo, Sr. Sabadell; vicepresidente, A. Muntané; secretario, A. Pierre; cajero, R. Camprubi; bibliotecario, Manuel de la Fuente; vocales, J. Chaves y L. Rafols. Se dan clases en: 1.<sup>o</sup> Grupo Esperantista de la A. E. P., profesor R. Camprubi.—2.<sup>o</sup> Centro de Unión Republicana, profesor Augusto Pierre.—3.<sup>o</sup> «Asociació Catalunya», profesor Domingo Bonet.—4.<sup>o</sup> «Centre Instructiu», profesor Miguel Cases.—5.<sup>o</sup> «Cataluno Espero», prof. Juan Rosals.

## Bibliografio

*Kio povas okazi, se oni donacas surprize*, de Fritz Reuter, tradukita el la subgermana dialekto de E. Ĉefeĉ (45, Christchurch Road, Streatham, Londono. S. W.). Prezo: 1 ekzemplero (presita sur arta papero), 0,70; 10 ekz. (propaganda eldono sur malpli dika papero), 5,00 fr. (1).

(1) Por mendoj oni sin turnu al la tradukinto S-ro Ĉefeĉ. Ĉiulandaj poŝtmarkoj estas akceptotaj laŭ sia efektiva valoro.

Tiu ĉi nova verketo 48 paĝa, kiu venas pliriĉigi la esperantan literaturon, estas humoraĵo originale skribita en lingvaĵo nur uzita en malgranda parte de Germanujo, kajaankoraŭ ne tradukita en ian modernan lingvon. Esperanto prezentas ĝin unufoje al la legado de ĉiuj diversaj nacioj.

La historio estas sprita kaj interesa kaj klare montras, ke ĝi devenas de la plej eminenta germana humoristo de la ĵus pasinta centjaro. Verkite plej grandaparte en rekta parolado, ĝi estas tre instrua kaj facile legebla. La tradukinto en la celo plivalorigi sian tradukon uzis elegantan, klaran kaj bongustan stilon, fonditan sur la «netuŝebla fundamento» de Esperanto, kaj submetis sian verkon al kritikado de ok diverslingvaj esperantistoj, penante, ke ĝi fariĝu plene internacia kaj enhavanta nenian naciismon.

Ĉiuj suprediritaj ecoj klare pravas la rekomendindecon de la nova literaturaĵo kaj se oni aldonas al tio, ke S-ro Ĉefeĉ eldonis sian verkon en celo propaganda, por montri, ke Esperanto prezentas la solan veran solvon de lingvo internacia, kaj por ke la verketo estu tradukata kaj komprenata nur per kelpo de la «Esperantaj Ŝlosiloj», kiujn li eldonis en la ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj ni rekomendis pli ol unu fojon, oni konkludas la gravecon, kiun ni aljuĝas al «Kio povas okazi, se oni donacas surprize» kaj la protekton, kiun ĝi indas ricevi de ĉiuj esperantistoj.

*Ĉielo kaj Tero* (The Heaven and the Earth) mistero de Lord Byron, Esperantigis D-ro Noel. Prezo: 1,35 fr.

Tuj post la belega traduko de «Rolandkanto», D-ro Noel prezentas al ni la esperantigon de la ĉarma Byron'a Mistero. Ĝuste, kiam la morto forprenis unu el plej sindonaj samideanoj, S-ro. A. Motteau, la lerta tradukinto de Shakespeare, la sorto montras al ni novan tradukinton de Byron. Sendube Shakespeare kaj Byron' allogas la Esperantistojn konantajn la lingvon anglan. Kaj se ni ŝuldas la plej majstran literaturan tradukon de Hamlet, al la elpensinto de Esperanto, ni ne devas forgesi la senriproĉan kaj multmeritan tradukon de Kaino de S-ro A. Kofman. Kaj efektive, kuraĝi esperantigi *Ĉielo kaj Tero*, kiam ni havas «Kaino», estus tro danĝera entrepreno por alia Esperantisto, kiu ne konus tiel profunde la versofaradon kiel ĝin posedas D-ro Noel. *Ĉielo kaj Tero* sin rekomendas mem al ĉiuj Esperantistoj. La pureco de la stilo, la klareco de la esprimado kaj la facilflua bonsoneco de ĝiaj versoj difinas por ĝi tre enviindan apartan lokon en la esperanta literaturo. Ankoraŭ novan econ havas la traduko de S-ro Noel, kiun ni tuj raportos. Tio estas la diverseco: en ĝia malmultenombra paĝaro la legantoj trovas versojn el plej diversaj specoj, rimitajn, senrimajn, longajn mallongajn, alternajn, k. c., tiel saĝe kombinitajn, ke la tutaĵo prezentas modelon por ellernado de esperanta versofarado.

Sed ho ve! Ni devas riproĉi malgrandan difekteton al la nova verko de S-ro Noel. En la unua paĝo, li prezentas tabelon de prozodiaj monstroj, inter kiuj sin trovas signoj por diferencigi *silabojn longajn* de *mallongajn*. Paroli pri silaboj longaj kaj mallongaj en esperanta versofarado estas simple erarigi la komencantojn. La akcento estas ĉefa elemento de la esperanta poesio; kiel moderna lingvo, Esperanto ne havas versofaradon fonditan sur diversa longeco de silaloj. Kiel oni povas reguligi la alternadon de silaboj longaj kaj mallongaj? Ĉu oni povas diri al ni, en kio konsistas la mallongeco aŭ longeco de la silaloj esperantaj? En la verso:

«Se-ra-fo! Min aŭ-du de l'Ŝu-pra Ŝi-de-jo!» La unua silabo *de* estus mallonga, la dua longa. La aŭdado en tiuj ĉi du silaloj nur povas trovi la jenan diferencon: ke la unua estas ne akcentita kaj la dua-akcentita.

Estas evidente, ke en vorto *trans-por-to*, eksemple, oni rimarkas, ke la silabo *trans* besonas pli da tempo ol *por* por esti elparota *kaf por* pli da tempo-ol *to*. Sed el tio ĉi, oni ne povas konkludi, ke la elparolata longeco de *trans* estas duobla ol tiu de *por*; kaj ankaŭ, ke inter tiuj ĉi diversaj longecoj ekzistas ia difinita kaj senŝanĝa

rilato, kiel estus ja necese por fondi versofaradon sur alternadon de silaboj longaj kaj mallongaj, kiel okazis, laŭ oni kredas, en la klasikaj lingvoj.

La elpensinto de Esperanto tre decide kaj saĝe solvis tiun ĉi aferon per sia difino de versofarado: «La esperanta versofarado konsistas el la regula alternado de silaboj akcentitaj kaj neakcentitaj» kaj ankaŭ li mem diris: «En Esperanto ne ekzistas silaboj longaj nek mallongaj sed akcentitaj kaj neakcentitaj.»

Ni esperas, ke D-ro Noel atentos tiun ĉi rimarkon, kaj forigos en dua eldono de *Ĉielo kaj Tero* la signadon de silaboj longaj kaj mallongaj.

V. INGLADA.



## NOVAJ ANOJ DE H. S. P. P. E.

El *La Guardia* (Jaén): 471, Enrique Gómez Beltrán; 472, Laureano Muñoz Escobar; 473, Serafin Baudín Agüero.—*Enguera*: 474, Emilio Marín Abella; 475, Joaquín Sanchis Rico; 476, Eduardo Palop Gozávez.—*Vigo* (Pontevedra): 477, Antonio Ferrer Marín; 478, Manuel Pereira Estévez; 479, José Sanz Torres; 480, Francisco López García; 481, Manuel Dovao.—*Barcelona*: 482, José Bartrolot; 483, Juan Chaves 484, Manuel de la Fuente; 485, Angel Rodríguez; 486, José Llorens Olió; 487, Juan Llarena; 488, Juan Caballero; 489, Jaime Durán; 490, Agustín Muntané; 491, Augusto Pierre; 492, Ramón Camprubi; 493, Luis Rafols.



## Korespondada fakto de "La Suno Hispana,"


### SINJOROJ:

E. L., Murcia.—S., London.—H. H., Keipley (Anglujo).—G. J. W. O., Sanhat (Indujo).—G. T. S., Newport Tay (Anglujo).—Fraŭ. M. P. A. C., Gracia.—J. C. M. Puerto de la Cruz (Canarias).—E. W., Invercargill (Nova Zelando).—M. L., Villarreal.—L. A., Valencia.—J. S. F., Castellón.—V. A., Castellón.—E. G., La Guardia.—J. G., Valencia.—M. O., Valencia.—R. P., Castellón.—N. E., Valencia.—J. O., Valencia.—S. E. E. K., Barcelona.—M. S., Reus.—J. P., Sabadell.—R. P. C. R., Castellón.—A. S. de R., Sevilla.—G. E. Bilbao.

Mi ricevus viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. Ĵ. L.



## NIAJ VIZITANTOJ

- N.º 33.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima* (Peruo). Jarabono, 3 fr.  
 Aprilo 1906.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde près *Tours* (*Indre et-Loire*, Francujo). Jarabono, Francujo, 4 fr.; alilando, 5 fr.  
 N.º 9-10.—**Espero Pacifista.** 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (Francujo). Jarabono, 5 fr.  
 N.º 3.—**Esperantisten.** 37, Surbrunnsgatan. *Stockholm* (Svedujo), Jarabono, 3'50 frankoj.  
 N.º 10, 11 kaj 12.—**El Mundo Ilustrado.** Aguila, 60, *Habana*. Numero 10 ctoj. I, 2 kaj 3.  
 Majo 1906.—**Germana Esperantisto.** Prinzentraŝse, 95, *Berlin S.* (Germanujo). Jarabono 3 markoj.  
 N.º 2.—**Internacia Revuo Medicina.** 33, rue Lacépède. *Paris*. Jarabono, 12 fr.  
 N.º 4.—**Juna Esperantista.** 9, Avenue des Vollandes, *Genève* (Svisujo). Jarabono, 2 fr. 50.  
 N.º 6, 7, II jaro.—**La Algieria Stelo.** 57, rue d'Isly, *Algér* (Alĝerujo). Jarabono, 3 fr.  
 N.º 45.—**La Belga Sonorilo.** S-ro J. Coox, *Duffel*, (Belgujo). Jarabono, 4 fr.  
 N.º 119.—**La Revue de l'Esperanto,** 26, rue Wissoq, *Boulogne-sur-Mer* (Francujo). Prezo, 0'10 fr. ekzemplero.  
 N.º 6.—**La Esperanta Studento.** 16. Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex. England. Jarabono, 2 fr.  
 N.º 9.—**Lingvo Internacia.** 33, rue Lapepède. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.  
 N.º 118, 119, 120, 121, 122.—**Murcia.** Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 6 pesetoj.  
 N.º 143.—**Museo Exposición.** Medina, 37, *Alicante*. Jarabono, 5 pesetoj.  
 N.º 4.—**Revista de Menorca.** Ateneo científico. *Mahón*. Jarabono, 6 fr.  
 N.º 4.—**Ruslanda Esperantisto.** S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24 (Rusujo). Unu numero 30 kopekojn.  
 N.º 3.—**Svisa Espero.** 6, vieux College, *Genève* (Svisujo) Jarabono, 2,50 frankoj.  
 N.º 17.—**The British Esperantist.** unuigita kun **The Esperantist.** 13, Arundel street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.  
 N.º 10.—**Tra la Mondo.** 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O.) (Francujo) Jarabono, 8 fr.  
 N.º 5.—**Unua Paŝo.** San Stefano, 26, Sofia, (Bulgarujo). Jarabono, 3 fr.

---

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

---

## ANONCOJ

*S-ro Etanislao Schels* (21. Ul. Teatralna. *Lwow* (Lemberg-Austria) deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj kun hispanaj geesperantistoj.

*S-ro Gustav Brimig*, bankoficisto, Steinmenstrasse 18, Berlin W. 5. F. Germanujo, deziras korespondadi kun hispana esperantisto.

*S-ro U. Dubois*, lernanto ĉe la liceo de Amiens (Francujo), deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun vidaĵoj kaj monumentoj, kaj uzitajn poŝtmarkojn.